Informilo

MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN DE VLAAMSE ESPERANTOBOND

VERANTWOORDELIJKE UITGEVER:
RESPONDECA ELDONANTO: Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel

JARKOLEKTO
JAARGANG 3 N° 6 OKT. 83

NOTUBONENOTUBONENOTUBONENOTUBONENOTUBONENOUTBONENOTUBONENOTUBONENOTUBONE

15 10 83 - BERGEN OP ZOOM : JUBILEA KUNVENO ĈIRKAŬ LA ZAMENHOFMONUMENTO

22 10 83 - ĜENERALA JARKUNSIDO DE BEF EN CHARLEROI

22 K. 23 10 83 - KOMUNA FERVOJISTA ARANĜO EN HEERLEN, NEDERLANDO

28, 29 K. 30 10 83 : INTERNĈIA JUNULARA RENKONTIĜO EN WAVRE

| 05 11 83 : E S P E R A N T O - B A L O |
|---|

NEFORGESUNEFORGESUNEFORGESUNEFORGESUNEFORGESUNEFORGESUNEFORGESUNEFORGESU

I N F O R M I L O . Kadrogazeto de FLANDRA ESPERANTO-LIGO
Aperas ĉiumonate, krom en julio kaj aŭgusto.
Jarabono : BF 150,-

---

| | |
|---|---|
| FLANDRA ESPERANTO-LIGO | Frankrijklei 140, 2000 ANTWERPEN - 03/234 34 00<br>Kontoj : 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43 |
| Prezidanto<br>Informado/Planado/Agado | Edward SYMOENS, Putsesteenweg 131 A<br>2180 KALMTHOUT - 03/666 62 66 |
| Estrarano pri Financoj | Erik D'HONDT, Wilgstraat 25 A<br>9440 EREMBODEGEM 053/77 44 97 |
| Sekretario | Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14<br>2510 MORTSEL 03/449 50 06 |
| Direktoro de GCA<br>Librotenado | Paul PEERAERTS, Kloosterstraat 35<br>2000 ANTWERPEN |
| Junularo | Kristin TYTGAT, St. Hathebrandstraat 8<br>2510 MORTSEL 03/449 50 24 |
| Intergrupa Agado | Hilde Van INGELGEM-VANDRIESSCHE , Arbeidstraat 21<br>9300 AALST<br>Trees DOOMS, Knaptandstraat 36<br>2700 St. Niklaas |
| Provincaj prezidantoj | Brabanto : M. Th. HENQUINEZ, Lipsestraat 166<br>2991 TILDONK<br>Limburgo : Guido SCHROEYERS, Helzoldstraat 113<br>3558 HELCHTEREN 011/53 64 10<br>Okc. Flandr.- Roland ROTSAERT, Visspaanstraat 97<br>8000 BRUGGE 050/33 00 04 |
| Kadrokursoj | André STAES, Jan Denucéstraat 1/198<br>2020 ANTWERPEN |
| Literaturo/Eldonoj | Christian DECLERCK, Amerikalei 135/2<br>2000 ANTWERPEN |
| Gazetara Servo | Herman k. Annie DECEUNINCK-BOLLAERT<br>Lusthuizenlaan 1 b.4, 1500 HALLE |
| Sciencoj | Wim DE SMET, Hertendreef 12<br>2180 KALMTHOUT |
| Cibernetiko | Willy HUYBRECHTS, Rozendreef 33<br>2180 KALMTHOUT |



# P R O T O K O L O

pri la estrarkunsido de sabato 01 10 1983 en Esperantodomo, Antwerpen.

---

Ĉeestis : Erik D'Hondt (ED), Trees Dooms (TD), Paul Peeraerts (PP), André Staes (AS)
Hilde Van Ingelgem (HVI), Jules Verstraeten (JV) k. Jan Bovendeerd (JB)

Petis senkulpigon : Roland Rotsaert, Anré Staes (antaŭtagmeze), Edward Symoens kaj
Kristin Tytgat (FLEJA-taskoj)

Malfermo : 10.30 h.

## T A G O R D O

1. La protokolo pri la estrarkunsido de 03 09 1983 estas aprobita.

2. Raportado pri plenumitaj taskoj :

2.1. La eldono de la verko de V_an Dooren (vd 03 09 83 - p. 3) verŝajne estos ebla antaŭ la venonta Zamenhoftago. La intenco estas lanĉi ĝin sammaniere kiel tiun de Rik de Roover antaŭ du jaroj; do, kiel premion por donacontoj de minimume BF 1.000,-

2.2. Rilate al la eldonado de nacilingvaj broŝuroj de ES, PP proponas uzi parton de la enspezoj el UK/82 kiuj ja perdifine servu al informado.
PP opinias bone antaŭe sendi eksplikan leteron al NEA, FEN, ECN k. UEA cele al mendado iliaflanke kaj fiksi la eldonkvanton konsiderante la mendotajn kvantojn.
Aprobite. PP kontaktos la diferencajn organizojn.

2.3. La problemo pri la FLEJA-subvencio Hoher Knüll estas solvita kiel proponite.

2.4. JV jam unufoje partoprenis kunsidon de "Raad voor Cultuur v.d. Prov. A'pen"

3. FINANCOJ.

3.1. S-ro De Schepper ankoraŭ ne anoncis buĝetproponon.
JV, ED kaj PP proponos 08 10 83 kiel kunsidodaton de la Financa Komisiono.
La buĝeto estu priparolota en la venonta estrarkunsido, je 19 10 83.

3.2. Rilate la financan situacion PP raportas :

3.2.1. Pli ol verŝajne ni finos la jaron per gajno, tamen ne sufiĉe alta por permesi "ŝtopi" la truon. Tamen ...

3.2.2. La membrovarbado iom pliboniĝis. Antaŭnelonge envenis ankoraŭ kotizojn por la kuranta jaro. PP Proponas sendi novan memorleteron, ĉefe al la izoluloj, kiuj fakte ĉijare apenaŭ reagis.
JB proponas konsideri la eblecon aligi la nun-ankoraŭ-pagontojn jam por venonta jaro. Unuanime favora reago de la ĉeestantoj.

3.2.3. La abonoj atingis jam 179 % de la pasintjara aboncifero.

3.2.4. Donacoj iom stagnas, sed restas ankoraŭ 1/4-a jaro.

4. BEF-ĝenerala jarkunsido de 22 10 83 en Charleroi - Nia sinteno :

4.1. Rilate al kongresoj ni proponos organizi FEL-kongreson ĉiujaran, krom se estos alia iniciato. En tiu eventualeco FEL rezignos pri sia kongreso por ne konkurenci la alian. Tamen, tiukaze necese estos ke ni sciu tion laste je la okazo de nia antaŭa kongreso.
Se BEF deziras ke la kongresoj estu tutlandaj, ĝi prizorgu daŭran kontinuecon kaj respondecu pri la eventualaj riskoj.

4.2.1. Pri kadrokursoj, ni proponu ke BEF estu la kunordiga instanco, i.a. por eviti ke la sama kurso estu prezentita diversfoje kaj por certigi bonan tempouzon. Pri la ellaborado de la unuopaj programeroj okupiĝu la al ili koncernaj instancoj.

4.2.2. Koncerne la kursotekstojn TD opinias ke pli efike estus eldoni ilin kajer-forme laŭ ĉapitro. Tio ebligus ne devi represi ĉiun fojon ĉiujn ekzistantajn tekstojn kaj permesus al la aĉetontoj elekti la preferatajn ĉapitrojn. Principe konsentite.

4.3.1. Same pri la jubilea jaro BEF devus respondeci, ĉar temas ja pri landa agado. Ni proponos al BEF kunmeti komisionon en kiu FEL-estraro aktive partoprenos. Tiu komisiono, starigota kiel eble plej rapide ĉar jam perdiĝis preskaŭ unu jaro !, kunvenu tuj-estonte por analizi la programon de UEA kaj priekzameni la realig-eblecojn.
Se BEF ne aktivos en tiu senco, FEL daŭrigos sola.
Unu punkto estas certa : se FEL devas fari la tutan laboron, tiam tio ankaŭ okazos en la nomo de FEL.

4.3.2. AS disponas jam pri kelkaj landaj agadprogramoj. Li intencas prepari super-rigardon kaj disponigi tiun al la interesitoj.

4.3.3. Jam kelkaj ideoj formuliĝis, nome la eldonado de antologio nederlanda en kunlaborado kun Nederlando. Ankaŭ la eldono de speciala poŝtmarko, sed tio ĉi estas tasko de BEF.

5. Diversaĵoj.

FEL-estraro ricevis de FLEJA-prezidanto oficialan inviton okazigi estrar-kunsidon en Wavre en la Junulara Renkontiĝo de 28, 29 k. 30 10 1983.
Konsentite.

Fino : 15.00 h.

Venonta kunsido : 29 10 83 en Wavre.

Protokolis JB.

------------------------



K O M U N I K O J

Korektendaĵoj : En via organigramo bonvolu korekti la telefonnumeron de Leo Corijnen en la ĉaptiro ORIENT FLANDRUJO, grupo St. Niklaas.
La ĝusta numero estas : 03/776 33 88

22 10 1983 : Ĝenerala jarkunsido de Belga Esperanto-Federacio
ekde 09.30 h. : estrarkunsido en MAISON DE LA CULTURE
29 Bld Audent
CHARLEROI
ekde 13.30 h. ĝenerala jarkunsido en URBODOMO - teretaĝo, sal. 4
Place du Manège
Charleroi
La programo estas sufiĉe grava por FEL. De ĝia sukceso dependos nia estonta agado.

22 k. 23 10 83 : Komuna aranĝo de Belgaj kaj Nederlandaj Fervojistoj
Info : L. De Sutter, Pijnbomenweg 4, 1180 Brussel 02/358 15 7[illegible]

28, 29 k. 30 10 83 - Junularrenkontiĝo
Loko : Bois de la Pierre
Chaussée de Namur 221
WAVRE
Tiu ĉi renkontiĝo estas alirebla por ĉiu kiu volas viziti ĝin.
FEL-estraro cetere profitos la okazon por organizi tie estrar-kunsidon.
Info : Jan Erreygers
Weldadigheidsstraat 26
3000 LEUVEN

05 11 83 : ESPERANTO-BALO
Loko : Salono ALPHEUSDAL
F. Williotstraat 22
BERCHEM proksime de la Berchema futbalstadiono
Tiu loko estas atingebla per la tramoj 7 (apud la Esperantodomo), 15 (apud la Centra Stacidomo) kaj buso 9.
La balo okazos en 2 diferencaj salonoj, unu kun moderna disko-muziko, unu kun klasika kaj stil-muziko.
Eblos tranokti, kondiĉe ke oni antaŭe sin anoncu ĉe Esperanto-Centro : 03/234 34 00.

Tiu ĉi balo estas la dua aranĝo kadre de la financa kampanjo ellaborita de la komisiono pri resanigo de la FEL-financoj.
Via partopreno estos do rekta kunlaboro en tiu programo.

Tio kondukas nin denove al la problemo pri la uzado de tempo. Oni ŝpare eluzu la sindediĉo-eblecojn de, ne nur novaj, movadanoj. Tial prefere la kursoj okazu en la ĝusta momento. Laste stariĝis la ideo organizi kursojn dum tuta semajnfino. Ĝis nun la proponoj ĉefe rilatis al pedagogiaj temoj. En tuta semajnfino oni povas profunde eniri kelkajn temojn kaj per tio eviti la diversfojajn vojaĝojn al iu loko por la kurso. Ni nomis la kursojn pedagogiaj kursoj, kvankam ili ne rekte rilatis al la formigo de instruistoj, sed plie celis spertigi la progresantojn en la lingvo. Iel tio povas inspiri nin al la ideo, ke la okazigo de kursoj pri historio, literaturo kaj metodiko, oni kunligu kursojn al lingvokursoj por progresantoj. Okazis jam kadrokurso pri TRADUKLITERATURO kaj montriĝis, ke ĝi funkciis sendepende de iu celo, krom la plenumo de la intelektaj bezonoj de la partoprenantoj. Oni devas garantii, ke ankaŭ lingvo-kursanoj rekte profitu el la rezultoj de tia kurso. Klare estas, ke la fako "INSTRUADO" diferencas de ekzemple "INFORMADO" kaj ke oni, rezulte el tio, atentu pri la specifaj bezonoj, ligataj al la diversaj studobjektoj.

A.Staes.

------------------------

## KOMUNIKOJ

Korekto. - En antaŭa numero ni anoncis la naskiĝon de infano al Mark kaj Susanne Van den Bempt-Mommaerts. Jen beadŭrinda eraro : ne temas pri Susanne, sed pri ANNE MARIE. Pardonon, Anne Marie !

-

Aldono : Al via organigramo bonvolu aldoni la telefonnumeron de H. Deceuninck (vidu Gazetara Servo), nome 02/ 360 17 22.

-

"EKSTRA PRODUKTIES.PVBA", Jos Wautersstr. 3, 2600 BERCHEM petas esti kiel eble plej multe informita pri niaj aktivecoj. Bonvolu, do, noti tiun adreson en vian adresaron kaj sendi viajn nacilingvajn informojn.

-

Nekrologo : Forpasis je 15 10 1983 en Genta ripozejo, S-ro Odön Lödör el Gent. Al la postrestaj geparencoj ni prezentas niajn plej sincerajn kondolencojn

-

TURISMO : JARFINA KARUSELVOJAĜO.

ESPERANTOTUR BRUSELO, Montoyerstr. 37/24, B-1040 BRUSELO proponas neforgeseblajn Kristnaskotagojn en Pollando kaj grandiozajn Silvestrotagojn en Budapeŝto en specialaj etoso kaj atmosfero en traveturotaj urboj, de 22 12 83 - 06 01 84.
Veturvojo : Zebruĝo - Bruselo - Helmstedto - Berlino - Słubiĉo - Bidgoŝco - Toruno - Ĉestoĥova - Ĉieszino - Martino - Budapeŝto - Vieno - Salzburgo - Bruselo - Zebruĝo.
Prezo : BF 25.000,- ĝirota en konton numero 961-0907434-91 de MONDA TURISMO BRUSELO antaŭ 30 11 1983.
Info : Leo De Bruyne p/a E.E.C. Montoyerstr. 37/24 1040 Bruselo, tel 02/513 95 95 aŭ 538 71 66.

PROTOKOLO

pri la estrarkunsido de sabato 29-a de oktobro 1983 en Wavre.

Ĉeestas : Edw. Symoens (ED), Erik D'HONDT (ED), Jules VERSTRAETEN (JV) kaj Jan BOVENDEERD (JB).

Petis senkulpigon : Paul Peeraerts kaj Trees Dooms (pro geedziĝvojaĝo) Guido Shroeyers (pro deJoro), Hilde Van Ingelgem, Herman kaj Annie Deceuninck-Bollaert, Kristin Tytgat kaj André Staes.

Prezidas : ES

Protokolas JB

TAGORDO

1. La protokolo pri la estrarkunsido de 01 10 1983 estas aprobita.

2. Raportado pri plenumitaj taskoj :

2.1.1. JB raportas pri la pasintsemajna ĝenerala kunveno de BEF, kie li komunikis la sintenon de FEL kiel priskribite en la protokolo de 01 10 83.
El tio rezultis ke BEF akceptas la estradon de la landa programo pri la jubilea jaro kaj ke APE estas preta kunlabori . La unua kunsido tiurilata okazos je sabato 19-a de novembro en Bruselo, kafeo LE PASSAGE Marnixavenuo 12 b - unua etaĝo.

2.1.2. En tiu kunsido JB petis specialan atenton al tio, ke la prezidanto de UEA estas nia samlandano G. Maertens kaj ke decus ke la belga movado pretus tutspecialan atenton al la jubilea programo. Li konstatas ke ĵus antaŭ la jubilea jaro GM devos forlasi sian postenon favore al alia, kiu tiam havas la honoron de la jubilea jaro, dum GM havos la respondecon de la tuta preparlaboro.

2.2.1. ES raportas ke li kaj Anne Tilmont renkontis S-ron Willy Kuypers, parlamenta kvestoro, en ties hejmo.
S-ro Kuypers, kiu favoras Esperanton, promesis serĉi kvar personojn el la kvar grandaj politikaj partioj por formi kernon en la parlamento cele al en-parlamenta agado. Li faros leteron en kiun ni povos enŝovi informmaterialon kaj kiu estos dissendita sub lia regado. La celo estas krei premgrupon en la parlamento.

2.2.2. ES ankaŭ proponis al K. Tytgat prizorgi ampleksan programon por-junularan por 1985, jaro de la junularo.

2.2.3. ES pli raportas ke la 7-a Monda Kongreso pri Aplika Lingvistiko, kiu okazos en aŭgusto 1984, akceptis lian kontribuajon "Lingvaj konsekvencoj de la kolonia periodo en Afriko" en kiu li defendas Esperanton kiel ĝenerala interkomprenilo.



Restas problemo tamen : tiu trovi kunlaborantojn por tiu kongreso.

3. Financoj.

3.1.1. ED kaj JV prezentas la buĝeton destinitan al la subvencidosiero de la ministerio pri kulturo kaj detale klarigas la diferencajn punktojn.

3.1.2. Kelkaj kontoj, kiuj ŝajnas ne-proporciaj al la ceteraj kontoj,estos esplorataj de ED kaj JV.

3.1.3. Notenda estas, ke por la unua fojo en la historio de FEL, la buĝeto estas en ekvilibro. Tio signifas ke ni estas sur la bona vojo al stabiligo de niaj financoj.

3.2. Diskutante la buĝeton, ni ankaŭ konstatas ke niaj administrantoj kaj kunlaborantoj (ankoraŭ) ne bone komprenis la neceson pri seriozaj pripren ado kaj kunlaboro en la financa programo.
Decidiĝas re-okazigi la administrantarajn kunsidojn, kiuj pro praktikaj kialoj estis anstataŭitaj de ĝeneralaj.

3.3.1. ES starigas la demandon "Kiom reprezentas en la buĝeto la eksterigon de Esperanto ? Kiomgrade la vera celo de la movado troviĝas en la tuto Ĉi tie li cetere denove substrekas la neceson koni nian verajn homfortojn; scii kiom da veraj esperantistoj nombras nia movado. Ni devas adopti nian agadon al niaj realaj fortoj, opinias li.

3.3.2. Ni esploru kiom da grupoj donis sekvon al nia peto resendi nian enketilon rilate al la konfidenca komuniko de la disponeblaj homoj.

4. Jubilea jaro.

4.1.1. JB revenas al la proponoj i.a. de ES pri eldono de ekz. Nederlanda Antologio en kunlaboro kun Nederlando. Tio implicus eldonon de Franca Antologio pere de APE kunlabore kun Francio. Tamen, kaj ĉi tie li renkontas la ideon de G. Maertens, kun kiu li diskutis la aferon, kiuj estos la partoj por respektive Flandrio kaj Valonio en tiuj antologioj Li do preferus (re)eldoni Belgan Antologion, Flandran k. Francan partojn Eks. kompletigi kaj ĝisdatigi la ekzistantan Belgan Antalogion de 1928.

4.1.2. La ceteraj ĉeestantoj kunsentas, sed ES tuj atentigas pri la urĝeco de tiu laboro, ĉar eblas ke kvanto da tekstoj devos ankoraŭ esti tradukita JB kontaktos C. Declerck por vidi kiamaniere ebligi tion.

4.2. Aliaj proponoj estas :

4.2.1. ES - Eldoni la Historion de Esperanto en Belgio.
ED kaj P. De Smedt jam okupiĝas pri tio. Unua parto, ĝis 1904, jam estas preta.

4.2.2. ES - eldono de kajero en la serio "Historiaj Rakontoj" (Historische Verhalen) uzataj an la bazaj lernejoj, pri la vivo de Zamenhof. Li ricevis jam la principan konsenton de la eldonisto (De Sikkel).

Problemo estas verki ĝin en lingvaĵo taŭga por la infanoj de bazaj lernejoj.

JB kontaktos R. de Roover en tiu rilato.

4.2.3. Plia propono de ES estas esplori la eblecon eldoni broŝurojn pri kaj de privataj firmaoj ekz. Bell Telefono, Gevaert, Janssen Pharmaceutiĉa, IBM ktp.

4.2.4. Ankaŭ terminaroj estus interesaj. JB tamen opinias ke terminaroj certe kaŭzas problemojn, jam pro la fakto ke en diversaj landoj oni uzas diferencajn terminojn por unu sama koncepto, kiuj tamen ne tute "kovras" unu la alian (ekz. en la asekura branĉo).

4.2.5. Konforme al la UEA-broŝuro "Kiu faru Kion?" (p.2 punkto 6) ES proponas kunlabori kun UEA per tradukado Esperante-nacilingven de elektitaj tekstoj el la verkaro de Zamenhof kolektitaj de UEA kaj en la verkado de baza libro kunmetota de UEA. Li tamen timas, ke tiuj tekstoj kaj baza verko aperos tro malfrue por ankoraŭ sukcese prizorgi la necesajn tradukojn.

4.2.6. Proponi al BEF zorgi por eldono de poŝtmarko kaj insisti pri tio, ke tio estos ebla nur pere de politikisto ( ekz. S-ro Piot)

4.2.7. ES verkis ankaŭ orientigajn leterojn, kiuj nun estas en preparo ĉe UEA.

4.2.8. Ankaŭ uzi la liberajn radiostaciojn, kiuj cetere ofte "ĉasas" novaĵojn por siaj elsendoj.

4.2.9. Klopodi interesigi eldonistojn por 1987, ekz. pere de deponado de verkoj en kaj pri Esperanto.

4.2.10. ES plie proponas alvoki al la grupoj kaj ĉiuj aktivuloj havigi al ni pliajn ideojn.

4.3. Financado

4.3.1. ES raportas ke en la Kalmthouta grupo proponiĝis krei fonduson provizatan de en la grupaj kunvenoj kolketita mono.

4.4. JB proponas sekvi la ekzemplon de la Norvegoj kaj krei "Klubo 100"-n t.e. jubilea fonduso. Li priparolos tion en la venonta kunsido de la jubilea komisiono.

5. Kongresoj

5.1.1. La rezultato de la lovena kongreso ankoraŭ ne estas konata. Ni petu ĝin al la organizintoj kaj priparolu ĝin se necese kun ili.

5.1.2. Se evidentiĝus ke la kongresoj ne estas finance interesaj, ni devos reprikonsideri nian decidon tiurilatan.

5.2. Laŭ ES niaj kongresoj ne devas esti nur ebleco al renkontiĝo kaj agrabla kunesto. Ili devas havi konkretan enhavon, bone preparitan.

5.2.1. Por la venontjara kongreso - Aalst, je 01, 02 kaj 03 09 84 - li proponas okazigi kolokvon pri "Kiel eliri el nia stagnado nuntempa? Kiuj estas la psikologiaj motivoj konvinkaj ?"

5.2.2. Por bone prepari tion, JB faros ĝeneralan alvokon, tiel pere de niaj propraj bultenoj, kiel pere de UEA (ESPERANTO) kaj Heroldo de Esperanto, por kolekti kiel eble plej multe da tekstoj, kiuj estos kunmetitaj kaj disponigitaj al la partoprenontoj al la kolokvo kaj kiuj servos kiel bazo de la pridiskutado. La celo estas konkrete kaj profunde pristudi la temon.

La kongresu vere utilu al la movado. Ni nepre reprikonsideru nian strategion.

5.2.3. Rilate al ebla premo de kostoj, ES sciiĝis ke en Kastelo de Ham (Steenokkerzeel) nun ekzistas ebleco pri kongresorganizado, do kun ebla tranoktebleco. Ni informiĝu pri tio plidetale laŭ-okaze. Ni nome zorgu, ke la pagitaj sumoj estus proporciaj al la celo de la aranĝo, alivorte ni elspezu kiel eble malplej ekster-movaden.



6. Turismo

6.1. JB opinias ke bone estus ellabori la turismon kaj disvastigi ĝin ankaŭ al aliaj regionoj ol nur orient-eŭropaj. Kompreneble, se tio okazos pere de BEF, FEL neniel profitos el tio.

6.2. ES atentigas pri du aspektoj :
- unue : turismo por ni, do por esperantistoj
- due : agado informcela en la turismaj medioj.

7. Gazetara rebatservo

ES petas ekstarti kvazaŭ-kampanjon por ke kiel eble plej multe da personoj okupiĝu pri la kolektado kaj ensendado de artikoloj kaj pri rebato de tiuj artikoloj kiuj necesigas tion.

JB anoncas ke A. Staes estas en rilato kun G. Pirlot pri tiurilata studotago kadre de la kadrokursoj.

8. Diversaĵoj

8.1. ES volus disponi pri FEL-diplomo uzebla de ĉiuj grupoj.
Ni petu projektojn.

8.2. JB opinias ke samtempe ni disponu pri FEL-ekzamenkomisiono.
Li disponigos la tekson de la regularo de UEA-ekzamenkomisiono por plia diskutado.

Fino 16.00 h.

JB

-----------------------------

K A D R K U R S O J - daŭrigo

Teknika valorigo.

En la antaŭa ĉapitro ni koncize analizis la motivon, kiu kondukis al la starigo de la ideo pri kadrokursoj. FEL nun jam havas mallongan tradicion rilate al tiu kocepto. En tri sinsekvaj jaroj, ses aŭ sep sabataj studotagoj estas organizitaj kaj akompane broŝuro aperis, per kiu la interesitaro povas sekvi la enhavon neĉeestante. Tamen, devas esti klare, ke la kursoj pli koncernas la praktikon ol la teorion. Pli gravas, ke ĉeestanto aktive partoprenas, ekzercas kaj proprigas al si la konendaĵojn ol havas iun supraĵan abstraktan konon pri ajna temo, tiel ke li aŭ ŝi povas nur kunparoli pri ĝi. Komprenenble, ne ĉiu temo same invitas al aktiva partoprenado. Se ni ekzemple vidas al la kursoj pri PAROLTEKNIKOJ, DEBATTEKNIKOJ kaj KOMUNIKADO-INFORMADO, tiam jam pro la titolo povas esti klare, ke temas pri praktikaj aferoj. Aliaj kadrokursoj, ekz. pri HISTORIO, LITERATURO kaj METODIKO pli referencas al teorio, kaj postulas pro tio malpli da iniciatemo kaj aktiveco de la partoprenantoj.

Ni konsideris la pliboniĝon de la movada laboro la akcelilo por la disbatigo kaj pligrandigo de la esperanto-komunumo. Kiel bazajn movadajn taskojn ni nomis INFORMADON, INSTRUADON, PRIZORGADON DE RIMEDOJ kaj KREADON DE APLIKEBLECOJ. Estas interese foje kompari ĝis kiu nivelo la temoj de la kadrokursoj kongruas kun la ĉefaj movadaj taskoj. Montriĝas, ke la kadrokurso KOMUNIKADO-INFORMADO rekte rilatas la kampon INFORMADO . Kiel akceptigi Esperanton de ne-esperantistoj ? Tiel ĝenerale formuliĝas la ĉefa demando. PAROLTEKNIKOJ kaj DEBATTEKNIKOJ kovras la terminon "PRIZORGADO DE RIMEDOJ". Ja temas pri la formigo de organizontoj de kongresoj, seminarioj kaj similaj, aŭ la edukado de gvidantoj de klubkunvenoj kaj estraraj organoj de la movado. Ni ankaŭ povas facile konstati, ke la fakoj HISTORIO, LITERATURO kaj METODIKO servas al instruistoj, do koncernas "INSTRUADON". Tamen oni ne blindiĝu pro la diversaj kategorioj. HISTORIO ekz. same multe povas utili al homoj, kiuj okupiĝas pri "INFORMADO"."INFORMADO", "INSTRUADO" kaj "PRIZORGADO DE RIMEDOJ" (kio ne nur temas pri kolektado de mono) formas la antaŭkondiĉojn por la "KREADO DE APLIKEBLECOJ". Indas informi al homoj, kio estas la postuloj por interesa programo. Laste okazis kadrokurso pri TURISMO, organizita de MT. La temo ligiĝis al la "KREADO DE APLIKEBLECOJ". Kiel oferti al homoj interesan programon, kaj kiel gvidi kaj organizi tion? Jen kelkaj pritraktitaj temoj. Fakte ĝis nun oni neglektis atenti pri la edukado en la "KREADO DE APLIKEBLECOJ" por Esperanto. Kompare kun la iniciatemo de junuloj en TEJO aŭ landaj grupiĝoj kiel PSEK, la peno, kiun dediĉas la gepatraj instancoj al tiu ĉi kampo, estas malgranda.

Menciindas, ke ne ĉiam la samaj personoj sekvis la supren omitajn kursojn de FEL. Iu interesiĝas pri "INFORMADO", aliulo pri "EDUKADO" aŭ alia temo. Ne mirindas sekve, ke la ĉeestantaro neniam abunde multnombras; meznombre deko da



personoj ĉeestas. Samtempe tiu ĉi rezulto estu atentigo. Oni ne tro longe ofertu la saman programon, ĉar verŝajne la nombro de potencialaj kandidatoj, kiuj ne jam sekvis la kursojn, baldaŭ elĉerpiĝos. Oni evoluigu la kursojn, surbaze de la jam donitaj lecionoj. Povus interesi la ĉeestontaron, ke ekde nun oni ellaboru unu el la diversaj temoj pli profunde. Oni konsideru la unuan serion de la kadrokursoj la trunko kaj nun oni disbranĉigu la kursojn laŭ la diversaj temoj.

Aldone al la kadrokursoj, tio estas la jam ekzistantaj trunkaj kursoj, FEL organizis studotagojn pri la bezono je REBATA SERVO (fakte oni priparolis la problemojn rilate al GAZETARA SERVO) kaj pri la AKIRADO DE FINANCAJ RIMEDOJ POR FEL. La temoj respektive koncernis "INFORMADON" kaj "PRIZORGADON DE RIMEDOJ". La unua kurso rekte rezultis en eklaboron de la flandra gazetara servo kaj krome inspiris al la starigo de eksperimento pri intertelefona reto, laŭ inspiro de valona ekzemplo. La dua ekzemplo temas pri provo resanigi la financan staton de FEL. Oni aranĝis kunvenon, en kiu ĉiu el la partoprenintoj povis montri sian inventkapablon por trovi novajn elspezojn. Ambaŭ kunvenoj kaŭzis grandan intereson far pli ol dek ĉeestintoj. Konkludeblas el tio, ke la kondiĉo por krei kadrokurson estu la ekzisto de konkreta solvenda problemo. La kurso aŭ laborkunveno estu 'necesa' kaj plie la 'rezultoj' de la kurso estu percepteblaj.

En la specifa enbelga situacio lastjare historiiĝas, ke diversaj instancoj, nome FEL kaj BEF prezentas la saman programon. Je vidpunkto de racia tempouzado tiu situacio ne povas esti konvena al iu. Prefere oni laboru interkonsentocele al iu divido de la laboro. Iu instanco povus respondeci ekzemple pri "INSTRUADO" - ni ne forgesu, ke en Belgio ne ekzistas Esperanto-Instituto kaj la instrua kampo estas preskaŭ ne strukturita - kaj do ĉefe okupiĝu pri 'pedagogiaj kadrokursoj'. Alia instanco povus pli profunde pritrakti "INFORMADON" aŭ "PRIZORGADON DE RIMEDOJ". En ambaŭ kazoj temas fakte pri organizado-kapabloj, ni povus pensi pri 'organizaj kadrokursoj' aŭ simila nomo. Gravas ke oni klare distingu la movadajn taskojn kaj ke ĉiu prenu en tio siajn respondecojn. Tamen estas konsiderinde, ke restas iu kunordiga instanco, tiel ke la ideo pri kadrokursoj ne sovaĝe diskreskos.

Montriĝis ka aliaj movadaj instancoj ol FEL ekinteresiĝis pri la formulo de kadrokursoj. En tio ne nur aktivas BEF, kiu parte organizas la kursojn internaciskale, sed ankaŭ lokaj kluboj inspiriĝis el tio. Tiel indirekte trafas nin la problemo pri la kunvenloko por la kursoj. La kursoj ne nepre ĉiam devas okazi en la sama loko, ekz. en la Esperanto-Centro en Antverpeno. La okazigo de kadrokurso en alia provinco aŭ urbo povas esti instigo por la tiea interesitaro. Eventuale FEL povas organizi kurson en la samaj tago kaj loko, kiam kaj kie okazas la aranĝoj de la 'intergrupa-agado de FEL'. La celo de tiaj aranĝoj estas, ke FEL diskonigu sian agadon en iu provinco de la lando. Kutime oni planas distran posttagmezon, sed alternative oni povas lanĉi la kurson tiam.

Kio estas la realaj eblecoj por Esperanto? Certe, nuntempe, oni pli interesiĝas pri la realaj perspektivoj, kiujn Esperanto alportas, ol pri la deziratai. Do eble la movada laboro fariĝis pli konkreta, bedaŭrinde ĝi ne fariĝos pli simpla. Unuflanke oni devas respondi al la skeptikismo, ne nur de la ekstera mondo (kiu nomas nin Esperantistoj!), sed ankaŭ el propra medio, kaj aliflanke oni devas motivigi kaj eduki esperanto-parolantojn, neatendante, ke ili aŭtomate efektivigos paŝon al aktiva vivo por Esperanto.

A.S.

WORDT VERVOLGD

NIET VERGETEN !!!!!!!!! NIET VERGETEN!!!!!!!!!!!!

**NOVEMBER 1983**

| Z | M | D | W | D | V | Z |
|---|---|---|---|---|---|---|
| | | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 |
| 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 12 |
| 13 | 14 | 15 | 16 | 17 | 18 | 19 |
| 20 | 21 | 22 | 23 | 24 | 25 | 26 |
| 27 | 28 | 29 | 30 | | | |

# esperantobal

zaal alpheusdal

f. williotstraat 22, berchem

---

Lastaj novaĵoj pri la VORTARO. Parto de la teksto jam estas kompostita. La lasta parto forsendiĝis en septembro. Baldaŭ ordiĝos la kontraktojn inter FEN, la laborgrupo kaj la eldonisto. Donacoj ankoraŭ envenis. Nun la donacpoto entenas 15.272,94 gld. La sumo bezonata estas 20.000 gld.

La ĝirkonto : NL 69 82 88 nome de FONDUSO ESPERANTO VORTARO, p/a T.J. van Woerden en Hago.

---